



# PENSEO

*N-ro 133*

*Okt./2002*

Monata Beletro Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 <http://anteo.topcities.com>

## Larmoj de Generalo (I)

*Liu Yazhou*

Oni diris, ke Generalo Zhang Zhizhong ne havis larmojn. Japanoj diris, ke li estas la unua viro de Ĉinio.

Kial? Ĉe la lokoj Xifengkou, Luguoqiao, Tai'erzhuang li multfoje plorigis amason.

Kiam li estis mortigita de japanoj en milito, la japanaj soldatoj staris vice kun salutoj al lia kadavro, ili gardis lian kadavron kiel sian propran generalon kiu forlasis militejon.

Kiam la japana armeo preteriris, lokaj popolanoj, sciiĝinte, ke sub la blanka morttuko kuŝas kadavro de Generalo Zhang Zhizhong, surstratiĝis kaj genuiĝis surtere kaj ploregis.

Iu kaptita divizikomandanto de Guomintang-armeo en la vico tre koleris kaj diregis, ke la Generalo Zhizhong ne havis larmojn kaj li ne volas vidi larmojn.

Efektive la generalo havis larmojn dum lia tuta vivo..

### (2) Tiam, la Ĉielo ĉiam ploris

Ĝi ploris pro la surtretita tero.

La armeo urĝe marŝis laŭ la fervojo Tianjing-Yangpu. La mondfama batalo inter la ĉina kaj la japana estis komenciĝonta tie.

Pluvegis. La tero tretita de soldatoj kaj ĉevaloj estis plena de kotaĵo.



Ekvenis la ordono:  
ĉesu marŝon!

En pluvado la  
soldatoj staris,  
Generalo Zhang kun  
nigra mantelo

surĉevalo venis antaŭ la armeon.

La milita klariono eksonoris kaj vizaĝoj de generaloj kaj soldatoj tuj ŝanĝis. La sono signifis batalon. Du pakitaj soldatoj estis puŝitaj al fronto.

La generalo firme rigardis ilin kaj nelonge li movis sian lipon al garnizona majoro Sun Eryong, staranta ĉe li.

Pafoj eksonis intense kaj antaŭ la hufoj de la ĉevalo kuŝis du kadavroj.

Generalo Zhang anoncis ilian krimon: “Hieraŭ ĉi tiuj du soldatoj prenis du ombrelojn el iu butikoj, ili ne pagis kaj eĉ batis la butikmastron. En tiu tempo mi devus mortigi ilin.” Zhang diris, “Ni havas batalon kaj ni devas vendi”. Li ordonis al la majoro Sun Eryong forigi la ŝnurojn sur la kadavroj kaj bone enterigi ilin.

Post kiam la kadavro estis forportita, kun malĝojo la generalo diris al si mallaŭte: Pardonon al mi, ke mi mortigas vin antaŭ ol vi mortigass malamikojn. Mi estas kulpa en tio ke mi ne povas vin kulturi bone.

Li klinis sian kapon.

Lia vicgeneralo estis tre malĝoja. Li pensis, ke la generalo verŝas larmojn, sed li eraris. La generalo eklevis sian kapon sen larmoj, tamen kun kolera voĉo. “Estas pli malbona afero ol tio,” li diris: “hieraŭ nokte kiam nia vicaro estis en la Tian-ge-vilaĝo, iu homo ŝtele eniris en vilaĝanan domon kaj seksatencis iun fraŭlinon. Dekses-jaran puran fraŭlinon! Ŝi edziniĝos kaj fariĝos partrino. Kiam tagiĝis la fihomo foriris, la fraŭlino jese diris, ke la fihomo estas mia soldato! Nun li estas inter la vicaro.”

La rigardo de Generalo Zhang estis kiel glavo. “Elstaru, se vi estas viro! Kiu faris tion?”


Viro devas alfronti sian faron!”

La aero koaguliĝis. “Elstaru. Pripensu vian patrinon, vian filinon.”

“Ne ŝuldu al ili, elstaru. Mi unue riverencu al vi.”

Li malrapide levis sian maldestran manon kun blanka manujo ĝis rando de la ĉapelo.

Ĉiuj silentis, nur aŭdiĝis sono de pluvado kaj vento. “Bone!” la generalo ridis, kaj li ridis terure. Li diris, “Pardonu min. La fraŭlino rakontis, ke la kruro de la fihomo estis gratita vunde. Ĉivespere ĉe dorma horo kontrolu ĉiujn oficirojn kaj soldatojn inkluzive min roton post roto.” (daŭrigota)



esperantigis Semio

EL **LAŬZI**



### ĈAPITRO 59

(Ĉi tie Laŭzi proponas “avarecon” kiel principon en la regado de la popolo kaj en la servado al la Ĉielo. Ĝeneraldire, ĝi signifas konservi forton kaj fari nenion, kio ne estas farenda. Laŭzi opinias, ke tiu ĉi principo devas esti sekvata kiel en la tenado de longviveco, tiel ankaŭ en la regado de la regno.)

Por la regado de la homoj kaj la servado al la Ĉielo<sup>1</sup>,

Ekzistas nenio pli bona, ol la principo de “avareco”.

Nur tenante sin je la principo de “avareco”, Oni povas esti senhasta kaj pretigi sin frue. Esti senhasta kaj pretigi sin signifas

akumuli la Virton de “avareco”.

Dank’ al la akumulo de la Virto, oni povas triumfe venki ĉiajn obstaklojn.

La potenco, kiu povas venki ĉiajn obstaklojn, estas nemezurebla.

Kun la nemezurebla potenco oni povas regi regnon.

Havante la fundamenton de regado, oni povas daŭrigi la suverenecon tre longe.

Tio estas nomata “la profunda kaj firma plantado de la radikoj”,

— en la maniero ĝui longan vivon kaj atingi eternan ekzistadon.

<sup>1</sup> Kvankam la ĉina vorto *shi-tian* estas laŭvorte tradukita kiel “la servado al la Ĉielo”, tamen ĝi povas signifi ankaŭ “la gardadon de tio, per kio oni estas dotita de la Ĉielo”, nome “la kulturadon de siaj korpo kaj morala karaktero”.

### ĈAPITRO 60

(Laŭzi opinias, ke la regno devas esti regata per “senagado”. Sekvante la principon de “senagado”, la reganto povas malebligi al malutilaj fortoj (ekz. fantomoj) malordigi la socion. Se la reganto faras agojn, li povas doni al malbonaj fortoj la okazon fari malutilon al la regno. Laŭ Laŭzi, la Saĝulo, kiu estas plej lerta en la observado de la principo de “senagado”, povas akordigi la interkontraŭantajn partiojn, kaj sekve li estas laŭdata ne nur de la partio pozitiva, nome la homoj, sed ankaŭ de la negativa, nome la fantomoj, pro sia Virto.)

La regado de granda regno estas kiel fritado de fiŝeto: kun zorgemo.

Se la mondo estas regata laŭ la Taŭo,

La fantomoj ne povas fari malutilon.

Tio ĉi estas ne tial, ke ili ne povas hanti,

Sed tial, ke ilia hantado ne povas esti malutila al la homoj;

Ne tial, ke ilia hantado ne povas esti malutila al la homoj,

Sed tial, ke la Saĝulo<sup>1</sup> tute ne faras malutilon al la homoj.

Ĉar la homoj kaj la fantomoj ne faras malutilon unuj al la aliaj,

Tial ili ambaŭ laŭdas la Virton de la Saĝulo.

<sup>1</sup> Vd. noton 1 de ĉap. 2.



tradukita de Wang Congfang

## Klasika Prozo

### Persvadado al Lernado

Sanktulo diris, ke lernado ne povas ĉesi mezvoje. La indigo, kvankam ekstraktita el la blua herbo, estas pli blua ol la blua herbo. Kaj glacio, kvankam formita el akvo, estas pli malvarma ol akvo. Ligno ŝanĝiĝas laŭ la inka fadeno de lignaĵisto. Kiam ligno estas kurbigita kiel rado de veturilo, ĝia kurbeco ankaŭ obeas al la cirkelo. Se lingo, seka pro sunumado aŭ vento, ne povas rektiĝi denove, la kaŭzo iras al ĝia longtempa kurbiĝo. Kiel lingo povas rektiĝi sub la inka fadenode lignaĵisto, tiel glavo povas akriĝi post frotado sur ŝtono. Se erudiciulo kontrolas kion li faras ĉiutage, li, kun prudento, kondutas senerare.

Mi pensas, ke estas pli bone se mi eklernas eĉ momenton ol se mi cerbumas tuttage. Mi preferas ascendi altaĵon por vidi ol pririgardi malproksimen sur la fingroj de piedoj. sed la ago estas malpli vasta ol alta loko de tio, kio estas grimpi je la manoj kaj piedoj. Kiam vi mansvingas sur altaĵo, vi povas esti vidata de malproksime, kio ne signifas, ke via brako plilongiĝas. Kiam vi vokas laŭ la vento, vi povas esti aŭdata klare, kio ne signifas, ke via voĉo plirapidiĝas. Tiuj, kiuj povas kovri mil liojn, veturas per rapidaj piedoj, sed per ĉaroj aŭ ĉevaloj. Tiuj, kiuj povas transiri mil riverojn, ne dependas de naĝado, sed de boatoj.

Ŝaĝulo ne malsamas kiel ordinaruloj, nur pro tio, ke li kapblas utiligi ilojn!

Amasiĝo de tero faras monton, kie ekprosperas vento kaj pluvo. Kolektiĝo de akvo faras profundan lagon, kie drakoj naskiĝas. Se oni akumulas siajn bonecojn por atingi virtecon, oni povas havigi al si altan animstaton kaj perfektan virton. Simile, se oni ne iras paŝon post paŝo, ili ne povas kovri mil liojn; se rojoj ne kunfluas, ne granda rivero estiĝas. Dum unu salto de bona ĉevalo egalas maksimume al nur dek paŝoj, aĉa ĉevalo povas kuratingi per dek-taga veturo pro sia persistado. Sen tia persistado, oni ne povas rompi putriĝintan arbon, kaj kun tia persistado, oni povas gravure sur metalo kaj ŝtono. Lumbriko ne havas akrajn ungojn nek fortajn muskolojn kaj ostojn, sed ĝi povas manĝi supran koton kaj trinki el profundaj fontoj, kio montras sian absorbiĝon. Tamen la krabo kun ok piedoj kaj du grandaj pinĉiloj ne loĝas tie, kie serpentoj aŭ murenoj vivas, kio manifestas ĝian malpaciencon temperamenton.

tradukis Liu Yue



## La Vivo de Pu Songling

(II)

### Partopreni en Ŝtata Ekzameno

Influante de la socio kaj familio, Pu Songling donis grandan atenton al sinpreparado por la ŝtata oficistiga ekzameno.



En 1658, Pu Songling 19-jara komencis partopreni en la loka ekzameno por novicoj. Li gajnis tri unuajn lokojn en ekzamenoj de Zichuan-gubernio, de Jinan-prefektujo kaj tiu prezidata de la mandareno ekzamena inspektoro de Shandong-provinco s-ro Shi Runzhang, kaj famiĝis por ia tempo.

S-ro Shi Runzhang mem estis fama poeto.

